

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 14 Eberswalde 1986- 08- 05

1. Por la Internacia Somera Esperanto Universita (ISEU) en Veliko Târnovo, Bulgario, la malgranda komisiono (Simon, Ullrich, Marinov) preparis la sekvontan prelegon: Pri kelkaj apertoj akiritaj dum la ellaborado de Esperanto- terminoj por la fors, scienco

En la jaro 1982 en Eŭropo kelkaj esperantistoj, laŭ profesie forstistoj, komuniĝis inter si, ke la tempo estus maturiĝinta, fondi internacian fakgrupon de forstistoj esperantistaj. Ni samopiniis pri tio, ke unu el la ĉefaj taskoj de tiu fakgrupo estus la kolektado resp. kreado de Esperant- lingvaj forstaj terminoj. En la jaro 1982 13 forstistoj interkonsentiĝis komenci la laboron pri forstfaka vortaro. Dum la kreado aŭ tradukado de fakterminoj certe ĉbaldaŭ rimarkas, ke tio estas malfacila afero, ĝar la nocioj troviĝas ekster la afero de la lingvo de la ĉiutaga vivo. Krome la nocioj en la diversaj lingvoj kaj landoj ne ĉiam estas samsencaj, sed pli- malpli de variita senco. Tiel ne estas mirige, ke en vortaroj Esperant- lingvaj, eĉ en PIV, estas troveblaj indikoj, kiuj ne kontentigas kompetentulojn. Tiu ĉi sperto sekvigis tion, ke en la jaro 1983 konsideris necesa premo, krei la forstajn terminojn surbaze de la difino de nocio. Bedaŭrinde sur la kampo de la forstscienco kaj forstmastrizado ne ekzistas kompleta internacia akordigita difino de la nocioj. Bedaŭrinde sur la kampo de la forstscienco kaj forstmastrizado ne ekzistas kompleta internacia akordigita difino de la nocioj. Ekzistas ja ekde 1971 anla terminaro kun difinoj aprobitaj de unuigita FAQ/ LUFRO- komitato por forsta bibliografio kaj terminologio. Pli malfrue oni kreis francan kaj italan, kaj ekde 1983 eĉ ĉinan tradukon. Sed evidente pro malkontenteco pri la ekzistantaj terminaroj oni rekomendis revizii la aferon. En la kadro de la landoj de la Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpo ekzistas nur malmultaj akordigitaj normoj por nia fako. Laŭ ĉiu stato necesas kaj necesas krei Esperant- lingvajn difinojn utiligante jam ekzistantajn difinojn, aprobitajn de IUFRO, kaj jam ekzistantajn nacilingvajn difinojn kadre de naciaj normoj. Se difinoj ne ekzistas, necesas, tutuncve ellabori la bezonatajn difinojn. Ni klopodas fari difinojn por nocioj, kiuj estas ĝenerale uzataj aŭ estas utilaj en la forstscienco resp. – mastrizado. Ni estas certaj, ke estos ankoraŭ pli longa vojo ĝis kiam estoa atingata kontentiga solvo por la plej gravaj nocioj. Plej komplika estas la prilaborado de tiaj nocioj, kiuj koncernas aŭ tuŝas la forstekonomion. En la du dominantaj ekonomiaj sistemoj en la mondo la nocioj kaj la difinoj estas kelkfoje tute diversaj. La Internacia Forstista Rondo Esperantlingva kiel la fakgrupo nun nomiĝas, klopodas pri tio, ke forstfakuloj parolantaj laŭeble plej multajn diversajn nacilingvojn partuprenu la ellaboradon de la Esperant- lingvaj forstterminoj. La latinida vortrezoro ja estas ĉefa bazo de Esperanto kaj la Esperanto kaj la latina lingvo estas grava bazo en terminografio pri sciencaj nocioj, sed mutempe ankaŭ la aliaj nacilingvoj povas kaj devas kontribui al la pliriĉigo de Esperanto. Montriĝis, ke ne estas fareble, diskuti la diversajn proponojn por la unuopaj nocioj kadre de ĉiuj interesitaj kunlaborantoj. Estas profitige prilabori la termino- proponojn per malgranda komisiono, konsistanta plej bone el reprezentantoj de diversaj nacilingvoj. Fakte nuntempe nia komisiono, la aŭtoroj de la prelego, estas du germanlingvaj kaj unu bulgarlingva forstistoj. La elekto de la plej trafaj E- terminoj el la prezentitaj proponoj estus farota nur laŭ lingvaj kaj fakaj vidpunktoj, kaj ne laŭ la olimulto- principo. Plimultaj rilatoj povus ludi ĉe la decido pri lingve samvaloraj proponoj. Estis la demando, ĉu ni proponu nur unu termino- proponon aŭ plurajn, Ni decidis, se ekzistas du aŭ kelkaj samvaloraj proponoj, indiki tiujn ĉi. En la faklingvo oni ĉiam preferu internaciismojn por la elekto kiel Esperant- lingvaj terminoj. Sed la internaciismoj estas relative raraj en la forsta fakterminaro. En kiu kazo oni enkonduku novajn vortojn por esprimi faknociojn? Tiuj ĉi novaj vortoj rilatas al novaj radikoj aŭ al oficialigitaj radikoj kun

nova signifo. Ni kompreneble estas konvinktaj, ke nian laborrezulton ekzameni Esperanto- lingvistoj. Ili decidu pri tio, ĉu la koncerna fakvorto lingve estas korekta. Ĝis hodiaŭ ni ankoraŭ serĉas lingvistojn, kiuj volas kaj povas helpi nin. Kiu Esperant- lingva traduko por iu fakvorto estu valida kaj fine uzata, pri tio nur la koncerna fakularo kaj la praktika uzado povas decidi. Por ke tiu Esperanto- scipovanta fakularo malgrandiĝu, ni preparas la Esperanto- fakterminojn en la kadro de multlingva forstfaka vortaro.

2. Ekde nun ni uzos la mallongigo de la lingvoj sur nia slipoj la indikojn laŭ la internacia normo “ iso r 639 Language symbols”

El tio rezultas la sekvontaj novaj mallongigoj:

germana	de	Esperanto	eo	slovaka	sk
angla	en	bulgara	bg	rumana	ro
hispana	es	ĉeĥa	cs	turka	tr

3. La malgranda komisiono proponas akcepti la sekvonta la sekvontajn terminojn:

0262	forstaranĝo	0308	brustalt(eo) o; brustnivelo
0264	agadcelo, (forsta)	0309	diamstro je brustalt(eo) o
0265	arbarizeco	0310	fagonusko
0266	mastrumkategorio, (forsta)	0311	fruktodono de fagoj
0269	senŝeligi, plene	0312	plantado, fofoforma; tufplantado
0270	falo de folioj/ PIV/; senfoliĝo	0313	stumpoŝos- mastrumado, kurt- cikla
0272	cerastomelo; bluiĝunge	0314	makiso
0275	fulmodifekto	0316	klenejo/ ul/
0276	bloko	0317	klengi/ ul/
0280	senarbejo/ KE/ ; (arbar) nudejo	0318	et- arbidkultivejo, daŭra
0281	nudigi	0319	dendrologio
0284	sterilizado de grundo	0320	depudat- ligno/ si/
0285	brulo, sugrunda	0321	super- sep- ligno
0286	grundvegetaĵaro	0322	densaĵo
0288	litiero; (grund) sternaĵo	0323	densaĵo- stadio
0289	grundvunado	0324	forstista, diplomita; forstinĝeniero, diplomita
0290	tuneligi	0325	lingnoinĝeniero, diplomita
0291	insekt(o) tunelo	0344	spiralkresko
0292	borfaruno	0077	seglidentaro
0293	borkerno	0078	trunkflosigi
0294	bonitedi	0081	premligno
0295	krudŝelo	0082	hakflegi;
0297	gardo, postbrula	0084	krudligno de fleghakado
0299	larĝ (- jar) ringa	0086	flegreservoj
0300	larĝesemado	0087	fleghakad- periedo
0301	brulligno	0089	diamstro- klaso
0303	haŭlado (de krudligno)	0090	alkresko, laudiametra
0304	haŭlado per kablo; kablohaŭlado	0092	sek- rezisteco
0305	haŭlado per ĉevaloj; Ĉevalohaŭlado	0093	sekarbo
0306	rompaĵo (de arboj)	0095	glano
0307	marĉarbaro	0244	tanŝelo, kverka
		0271	tanŝel- kopso , tverka

Dr. K. –H. Simon

Por [publikigo en](#) "Tutmondaj Sciencoj Kaj Teknikoj"

Pri kelkaj spertoj akritaj dum la ellaborado de Esperanto- terminoj por la forstscience

Simon, K.–H. kaj Ullrich, I., Germana D. R.; Marinov, B. D. Bulgario

En la jaro 1982 en Europo kelkaj esperantistoj, laŭ profesio forstistoj/ arbaristoj komunikigis inter si, ke la tempo estus [maturiĝinta](#), fondi internacian fakgrupon de forstistoj esperantistoj. Ni [sanepiniis](#) pri tio, ke unu el la ĉefaj taskoj de tiu fakgrupo estu la kelektado resp. kreado de Esperant- lingvaj forsta terminoj. Ekzistis ja kelkaj du- aŭ multlingvaj fakvortaroj de la forsta vorttrezero, sed mankis informo pri iu ajn forstfaka vortaro Esperant- lingva. Dum la kreado aŭ tradukado de fakterminoj certe ĉiu baldaŭ rimarkas, ke tio estas malfacila afero, ĉar la nocioj troviĝas ekster la afero de la lingvo de la ĉintaga vivo. Krome la nocioj en la diversaj lingvoj kaj landoj ne ĉiam estas sumsencaj, sed pli- malpli de varita senco. Tial ne estas mirige, ke en vortaroj Esperant- lingvaj, eĉ en PIV, estas troveblaj indikoj, kiuj ne kontentigas kompetentulojn de la respektiva fako. Tiu ĉi sperto sekvigis tion, ke ni en la jaro 1983 konsideris necesa premo, kolekti resp. krei la forstajn terminoj surbaze de la difino de nocio. Bedaŭrinde sur la kampo de la forstscienco kaj forstmastrumado ne ekzistas kompleta internacia akordigita difino resp. norma de la nocioj. Ekzistas ja ekde la jaro 1971 angla terminaro- Terminology of Forest Science, Technology Practice and Products- kun difinoj aprobitaj de unuigita FAQ/ IUFRO- komitato por forsta bibliografio kaj terminologio. Pli malfrue oni kreis francan kaj italan, kaj la jaro 1983 eĉ ĉinan tradukon. Sed evidento pro malkontenteco pri ekzistantaj terminaroj oni rekomendis revizii la En la kadro de la landoj de la Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpo (KREH) ekzistas nur malmultaj akordigitaj normoj por nia fako. Laŭ tiu stato necesas kaj necesas krei Esperant- lingvajn difinojn utiligante jam ekzistantajn difinojn, sprobatajn de IUFRO, kaj jam ekzistantajn nacilingvajn difinojn kadre de naciaj [nermoj](#) se mankas KREH- normo. Se difinoj ne ekzistas, necesas, tute nove ellabori la bezonatajn difinojn por nocioj, kiuj estas ĝenerale uzataj aŭ estas utilaj en la forstscienco resp- mastrumado. Ni estas certaj, ke estos ankoraŭ pli longa voje ĝis kiam estos atingata kontentiga solvo por la plej gravaj nocioj. Plej komplika estas la prilaborado de tiaj nocioj, kiuj kcernas aŭ tuŝas forstekonomion. En la du dominantaj ekonomiaj sistemoj la nocioj kaj la difinoj estas kelkfoje tute diversaj. La Internacia Forstista Rondo Esperantlingva (IFRE), kiel la fakgrupo nun nomiĝas, klopodas pri tio, ke forstfakuloj parolantaj laŭeble plej multajn diversajn nacilingvojn partoprenu la ellaboradon de la Esperant- lingvaj forstterminoj. La latinida vorttrezero ja estas ĉefa bazo de Esperanto kaj la latina lingvo estas grava bazo en terminografio pri sciencaj nocioj, sed nuntempe ankaŭ la aliaj nacilingvaj povas kaj devas kontribui al la pliriĝigo de Esperanto. Montriĝis, ke ne estas fareble diskuti la diversajn proponojn por la unuopaj nocioj kadre de ĉiuj interesitaj kunlaborantoj. Estas profitige prilabori la termino- proponojn per malgranda komisiono konsistanta plej bene el reprezentantoj de diversaj nacilingvoj. Fakte nuntempe nia komisiono, la aŭtoroj de la artikolo, estas du germanlingvaj kaj unu bulgarlingva forstistoj. La elekto de la plej trafaj E-terminoj el la prezentitaj proponoj estu farota nur laŭ lingvoj kaj fakaj vidpunktoj, kaj ne laŭ la plimulto- principo. Plimultaj rilatoj povus ludi ĉe la decido pri lingve samvaloj proponoj. Por plifaciligi la elekton el la proponitaj Esperanto- terminoj la malgranda komisiono klasifikas la proponitajn terminojn laŭ taŭgecaj grupoj:

grupo 1	=	taŭga (tre trafa, bone trafa)
grupo 2	=	lingve malkorekta (sed post korekte = grupo 1)
grupo 3	=	taŭga, sed en alinaj vortaroj pli bona, pli trafa
grupo 4	=	ebla, sed malpli trafa aŭ duba
grupo 5	=	lingve malkorekta, post korekto tamen maltaŭga
grupo 6	=	malkorekta laŭ ideo

Helpe de tiuj ĉi elektokriterioj la komisiono celas objektivigi siam laboron. Estis la demando, ĉu ni proponu nur unu termino- proponon aŭ plurajn. Ni decidis, se ekzistas du aŭ kelkaj

samvaloraj proponoj, indiki tiujn ĉi. Ankaŭ la faklingvo estu elasta kaj dinamika. Oni devus rezervi la aplikon de pluraj esprimvarintoj. Sed kompreneble nun vorto aŭ vorto aŭ vortkunmetaĵo havas la unuan lokon kiel termino.

En la faklingvo oni ĉiam preferu internacilismojn por la elektokiel Esperant- lingvaj terminoj. Sed la internacilismoj estas relative raraj en la forsta fakterminaro. La forstmastrumado estas branĉo de la ekonomio kun relative longdaŭra tradicio en la homa socio. Tial multaj terminoj estas profunde enradikiĝintaj en la naciaj vorttresoroj. En kiu kazo oni enkonduku novajn por esprimi faknociojn? Tiuj ĉi novaj vortoj rilatas al novaj radikoj aŭ al oficialigitaj radikoj kun nova signifo. La kreado kaj la enkonduko de novaj vortoj estas neoviteblaj pro la sekvaj konsideroj:

- por atingi plej altan trafecon de la nocioj
- por eviti oli longajn parafrazojn de la nocioj
- por teni la lingvon elasta kaj dinamika.

Ni klopodas ne troigi kaj limigas la enkondukon de novaj vortoj jeesceptoj. Elektinte dum la ellaborado de la unuaj 360 nocioj ses novajn vortradikojn (ses substantivajn kaj unu verban radikojn) la komisiono proponas akcepti ilin:

bonitado	= kvalito, mezuro por la produktapotenco (de arbarero)
dopuinto	= naturaĵoj, kiujn ricevas rajtigantoj sen aŭ por eta pego
intercepcio	= dumtempa reteno de pluvo kaj neĝo far plantkovraĵo
litiero/ UL	= surtera tavolo de organikaj substancoj (kiu taŭgas kiel sternaĵo por bruto)
repelento	= fortlimiganta substanco, kiu retenas la bestojn de la manĝado de traktitaj plantoj
klenigi/ UL	= sekigi strobilojn por ekstrakti semojn

Kron tio ni proponas la pligrandigon de la signifo de sep vortoj, kiujn enhavas jam PIV en aliaj signifoj. Tiuj ĉi estas: bonko, etato, kvartalo kaj forstumi, haŭli, manipuli, stapli. Ni kompreneble estas konvinkitaj, ke niajn laborrezukton ekzamenu Esperanto- lingvistoj. Ili decidu pri tio, ĉu la koncerna fakvorto lingve estas korekta. Ĝis hodiaŭ ni ankoran serĉas lingvistojn, kiuj volas kaj povas helpi nin. Kiu Esperant- lingva traduko por iu fakvorto estu valida kaj fine uzata, pri tio nur la koncerna fakularo kaj la [praktika](#) uzado povas decidi. Por ke tiu Esperanto-scipovanta fakularo malgrandiĝu, ni preparas la Esperanto- fakterminojn en la kadro de multlingva forstfaka vortaro.